**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO (UEA)**
**KER-EKZAMENA SISTEMO**
**OFICIALA SINDEVIGO por testverkantoj**

# Sindevigo pri konfidenco, sekureco kaj profesiaj devontigoj

Mi, la subskribinto, konscia pri la respondeco ligita al la preparado, traktado kaj protekto de ekzamenmaterialoj en la KER-ekzamena sistemo de UEA, solene sindevigas jene:

**1. Konfidenco**
Mi konservos striktan konfidencan traktadon de ĉiuj ekzamenmaterialoj kaj rilataj dokumentoj (*taskoj, tekstoj, testoj, sondosieroj, taksokriterioj, solvoj, internaj instrukcioj*), kiujn mi kompilas, ricevas aŭ ekkonas dum mia laboro aŭ trejnado.
Mi ne diskonigos ilian enhavon al ne-rajtigitaj personoj en ajna formo aŭ medio.
Tiu devontigo validas ankaŭ post la fino de mia kunlaboro.

**2. Limigita uzo kaj neuzo por propraj lernantoj**
Mi uzos la materialojn nur por oficialaj taskoj aprobitaj de la KER-sistemo.
Mi ne reutiligos ilin por privata instruado, kursoj aŭ publikigaĵoj.
Mi ne uzos nek aludos al ili antaŭ miaj propraj kursanoj aŭ privataj lernantoj, nek rekte nek nerekte.

**3. Sekura stokado kaj dissendo**
Mi konservos dokumentojn nur en sekuraj, alir-limigitaj medioj kaj uzos aprobitajn kanalojn por ilia dissendo.
Mi ne stokos materialojn en publikaj aŭ neprotektitaj aparatoj aŭ servoj.

**4. Trejnaj materialoj**
La sama konfidenco validas por ekzemplaj testoj kaj materialoj viditaj dum la trejnado de testverkantoj.
Mi ne kopios, notos por posta uzo nek reproduktos ilian enhavon.

**5. Protekto kontraŭ neaŭtorizita aliro**
Mi zorgos, ke neniu ne-rajtigita persono havu aliron al la materialoj.
Mi ne dividos pasvortojn aŭ alirrajtojn kaj tuj raportos ajnan suspektatan sekurecrompon.

**6. Kopiado, redono kaj detruo**
Mi ne faros pri la materialoj  kopiojn (inkluzive fotojn, skanaĵojn aŭ ekranfotojn).
Post plenumo de la tasko aŭ laŭ peto, mi redonos aŭ sekure detruos ĉiujn materialojn en mia posedo.

**7. Konflikto de interesoj kaj proksimuloj**
Mi deklaras, ke laŭ mia scio neniu el miaj proksimaj familianoj aŭ personoj kun kiuj mi havas proksiman rilaton estas aktuale kandidato por KER-ekzameno.

Kaze ke mi ekscios, ke iu el tiu rondo intencas trapasi KER-ekzamenon, mi senprokraste informos la respondeculon, plej malfrue naŭ (9) monatojn antaŭ la planata ekzameno.

**8. Proprieto de materialoj**
Mi konscias kaj akceptas, ke ĉiuj kompilitaj testoj, testeroj kaj rilataj materialoj estas la ekskluziva proprieaĵoto de UEA/KER kaj ne mia persona proprieaĵo.
Mi ne rajtas publike uzi aŭ disponigi ilin sen eksplicita permeso.

**9. Financa rekompenco**
Mi konscias, ke honorario por testverkado estas pagata nur post kiam la koncernaj testeroj aŭ testoj estas efektive elektitaj por uzota ekzameno kaj la reala ekzameno okazis.
La honorario estas kalkulata kaj pagata postekzamene, laŭ la valida ekzamenregularo de UEA.

**10. Respondeco**
Mi komprenas, ke malobservo de ĉi tiu sindevigo povas konduki al eksigo el la testverkanta teamo kaj al aliaj rimedoj laŭ la regularo kaj aplikebla juro.

Nomo kaj familia nomo:

Retadreso:

Loko kaj dato:

Subskribo (tajpita nomo aŭ cifereca subskribo):